

BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio
Hungarujo, Budapeŝt, IX.,
Mester ucca 53, V. 7. —
Telefonnumero: 380-84

REDAKTAS:
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj al
Literatura Mondo kaj anoj
de AELA. — Aparta abono
1.80 svisaj frankoj por jaro

Revuo de Revuoj

Depost la lasta revuo de revuoj multaj eventoj traŝvebis la esperantan ĉielon. Kaj ŝajnas ke ankaŭ la esperantistoj estas homoj: multaj eventoj signifas grandan paperplenigadon. La situacio en Germanio, la kongreso, la sandirektiĝo de Germana Esperanto Asocio, kaj — por ke mi menciui ankaŭ ion gajan — la unuecigo de nia movado; ĉiuj estis okazoj uzi inkon (por skribadi), pulmon (por kriadi) kaj inkujon (por kio ĉi lasta, tion mi ne perfidas, ĉar mi volas gardi la ŝajnon ke esperantistoj estas *pacaj* batalantoj). La gazetaro aspektas batalkampe pli ol iam, ĝia mieno estas tiom minaca, ke mi ne kuraĝis teni ĝin inter miaj ĉastaj librinoj; la dikaj literoj, substrekoj kaj duoblaj krisignoj minace svarmas en ĝi.

Memkompreneble la kanonbruo pleje aŭdiĝas el la laboristaj organoj. La kutima disputado inter La Socialisto kaj Sennaciulo (kune kun Sennacieca Revuo) ankoraŭ daŭras; pro la fondiĝo de ISE ĝi eĉ forte pliakriĝis. Sed pri la »germanaj aferoj« (la ĉi-jara kongreso kaj la sandirektiĝo de la Germana esperantistaro) ili ĉiele konkordas: plenpulte mallaŭdas. Iĉokon kaj la meritplanan Führer-on de la germanaj esperantistoj.

Cetere *Sennacieca Revuo* impresas tre bone. La 4-5-a N-o havas sur sia kovropaĝo bonege sukcesintan karikaturon pri la bonege sukcesinta aŭtodaŭfo, desegnitita de G. Grosz. Gardante nian neŭtralecon laŭ religia vidpunkto, mi reskribas parteton de artikolo »Por nia medito« de s-ano Barbedette, kiu — post citado de opinioj de kelkaj kontraŭ-Jesuaj religio-ologoj, — manifestas jene: »Tiel kompatinde disfalas la kredoj koncerne Jesuon kaj lian dian mision.« Rimarkinde, ke malgraŭ (aŭ ĝuste »graŭ«) tiuj kompatoj la Eklezio ŝajnas ankoraŭ sufiĉe bone farti.

Se mi jam estas ĉe la gardado de neŭtraleco, mi citu samtempe kelkajn liniojn el deklaro de Vaugoin, Aŭstria ministro (Aŭstria Esperantisto, N-o 8-9-a): »Subtenanto de la internacia lingvo fariĝu ĉiu, al kiu la paco inter la popoloj kuŝas surkore, ne lastvice la *soldato*, sen nacia diferenco, kiel *destinita gardanto de la paco*.« Mi ne sciis kion opinii, se s-ro Vaugoin ne estus la ministro de la militaj aferoj.

Post tiu malgranda deturniĝo mi reiru la laboristan gazetaron. En *Sennaciulo* menciindigas mildaj frazoj: »Sed tiu ĉi fenomeno (nome la burĝa esperanta verkado) por ni signifas nur esperantlingvan paperplenigon«, »Per laborist-tendencaj, por niaj celoj utilaj libroj ni devas elbati el la manoj de la suprajemuloj tiujn librojn, kiuj estas plenigataj nur per amaj

aventuroj aŭ religiecaj stultajoj. Ĉu la samideanoj en SAT havas sekrete verkistojn, kiuj detruos per siaj mondskaj ĉefverkoj la ĝisnunan »neklas-bataleman« literaturon?

La *Socialisto* memkompreneble ĝoje salutas la fondiĝon de ISE (malbenata de SAT), kies oficiala organo ĝi fariĝis. Precipe sukcesaj mi opinias la du laŭvidpunkte redaktitajn numerojn 9-a kontraŭmilita kaj 11-a porvirina.

Svenska Arbetar Esperantisten, fidela disĉiplo de Sennaciulo aspektas tre bonguste, sed ĝi redaktiĝas preskaŭ tute en sveda lingvo. Parto temanta pri la loka movado — kiu do interesas nur svedojn — tamen estas esperanta. Tiel renversigas la hungara proverbo kaj la brasiko konsumiĝas, dum la kapro restas malsata.

En la *Germana Esperantisto* parolas Adolf Hitler tra 6 dense presitaj paĝoj en traduko de Esperanto-Führer Behrendt. Mi volonte citus kelkajn perlojn, sed elekti bedaŭrinde ne sukcesinte, mi rezignas. Behrendt raportas ke elektoj de esperanto-grupo-prezidantoj de nun ne okazos, plue ke li cedos al la konsiloj de la »Führerrat« laŭ ebleco. Tre laŭdinde.

S-ano Karl Minor daŭras recenzi. Li protestas i. a. kontraŭ la adverbo en »pale ekrigardis la kardinaloj« (Lejzerowicz) kaj opinias pli ĝusta »palaj«. Konsiderante, ke *ekrigardi* estas verbo, mi kaprompas, kial la romanoj nomis la adverbion ad-verbium?

Nun venu la kontraŭulo de GE, *Pola Esperantisto*. S-anoj Lejzerowicz kaj Wiesenfeld diligente mallaŭdas la germanajn okazaĵojn. El kompetenta fonto mi scias, ke Hitler jam forte maltrankviligas.

Svenska Esperanto Tidningen ĉiam pliboniĝas (eble la venonta kongreso ankaŭ efikas). En N-oj 9 kaj 10 mi trovis interesan kaj tre bonstilan vojaĝopriskribon de Ella Nilson: »Stockholm-Tallinn-Leningrad-Moskva«. Krome en N-o 9 s-ino Magda Carlsson tradukis poemon de Karlfeldt. La traduko estas tre bela kaj malkaŝas respektindan talenton de la tradukintino.

La suda stelo daŭras boni. Ĝin karakterizas interesa enhavo kaj bona redaktado. En N-o 7 legeblas tre atentinda artikolo de la june mortinta s-ano Franjo Homar pri la tradukoj de »La morto de Smail-Aga Cengijić«. En la artikoloj estas citataj kelkaj partoj el iu »eseo« pri la sama temo, aperinta en »Kroata Revuo«. Strangajn aĵojn asertas tiu verkinto. Citinda estas ĉefe tiu ĉi opinio: »La du italaj tradukoj estas nur palaj refleksoj de la originalo... ĉar la itala lingvo ne kapablas doni la naturan koncizecon kaj originalan sonorecon (1) de l' kroataj versoj.«

En sia recenzo pri la traduko de »Servulrajto« Milica Djurić-Topalović deklaras ŝokan juĝon, kiu estas riproĉinda, ĉar ĝi jam ne estas citaĵo, sed propra opinio de ano de l' redaktanta rondo. »Kaj dum nin (la traduko de) Ifigenio de Goethe postlasas indiferentaj(!), ĉar ĝia lingvo estas plumpa(!) ...« La fotoj de du skulptaĵoj de l' fama kroata skulptisto Ivan Meštrović estas belaj kaj igas min scivola pri liaj aliaj verkoj, kiujn mi esperas vidi en iu sekvanta N-o de *La suda stelo*.

The British Esperantist. En N-o 340 la recenzo pri l' libro »La amo en la jaro dekmil« malkaŝas mirindajn vidpunktojn de la recenzinto. Inter alie li diras: »La titolo eble pensigas kelkajn pri ia seks-obsedita traktajo de iu, kiu povas vidi nur tiun faktoron de la vivo; sed ĉu estis kun mokrideto at tiu nun pasanta modo de verkado, la aŭtoro ktp., ktp.« Ĉu la nuna modo de verkado estas seks-obsedita? Iom supraĵa kaj sekve tre maljusta ĝeneraligo. La 36 vortoj de K. R. C. S. pri la libro »Kontraŭ la regantaj

perceptoj pri krimo kaj puno« diras trafe multe pli multon.

La sama numero ĝojigis min per mirinda malkovro: esperanto ankaŭ dum pluvo paroleblas. »Dek knabinoj el la Country School vizitis la tendaron ĉe Cleadon (kiaj moroj, cetere?! kaj malgraŭ la pluvo ĝuis esperantan babiladon.« Gratulinde.

Citinda strofo el »Al nia paca batalo« de Wm. Harvey:

»Spite de la mokoj de miopa stultular'»

Nin salutas anoj de klarvida amikar'»

Sur la voj' celita de la Esperantistar'»

Al nia paca batalo.«

Kaj oni ankoraŭ aŭdacas dubi pri la alta evoluo de la esperanta verstekniko.

Flandra Esperantisto samtonas kun Pola Esperantisto pri la »jubilea« kongreso. Precipe ĉarme ĝi rakontas pri la germana tramista grupo veninta al la malferma kunsido kun sia verda standardo prudente envolvita en papero.

Novelo »La ampoemo de Jan Mijs« estas ĉarmeta, des pli malbona estas »Ni progresas« de mia samlandano Nikolao Lörincz. Ĉu Spierer sukcesas trovi nur tiel malfortajn specimenojn en la hungara novelliteraturo. La »varba« dialogo »Pri Esperanto« represita el Germana Esperantisto estas pomen malproksimen falinta de sia arbo.

La Progreso enhavas tre interesajn artikolojn. La novelo de Lajos Biró en la traduko de A. Feldmannova estas laŭdinda enave kiel lingve. Al la artikolo »Meditado pri propagando« de F. Stanek la redaktoroj almetis, ke ili scias la aliopiniecon de la publiko. tial ili volonte akceptos ankaŭ aliajn artikolojn por komuniko. Fakte, la verkinto pruvis pri tre stranga pensmaniero. Li volas, ke la esperantistoj adaptiĝu al la tiom pridiskutita interna ideo, sed ne ĉe la komenco. Tiu koncepto signifas alivorte ke la homoj kapablas ŝanĝiĝi je la efiko de Esperanto. Sed tion kontraŭas la faktoj, ĉar ekzistas esperantistaj unuigoj hokokrucaj, naciismaj, eĉ ŝovinistaj

Kaj nun: Hungara Heroldo. Iom mire mi atentis jam delonge pri la konstanta pikado de s-ano Takács, kiu en sia Nagymaros-a soleco pasigas la tempon per atakadoj kontraŭ Literatura Mondo kaj Mondanoj. Nun li sukcesis kapti kunulon en la persono de Balkányi, kiu ĝis nun detenis sin de tiaĵoj. En sia »kritiko« pri Hungara Antologio, Balkányi konstante pardonpetadas kaj modestadas. »Mi ne kuraĝas skribi kritikon«. Li sentas la kompilitojn super si; jen la kaŭzo, kial mi prenis la taskon respondi: mi staras sub li.

1. Se Balkányi estus redaktinta la Antologion, ĝi certe estus pli kompleta: li estus ŝtopinta en ĝin ĉiujn aŭtorojn, kiujn li postulas de la redaktinto. Poste — li estus povinta meti grandan premion al la aŭdaca heroo de pacienco, kiu riskus ĝin legi.

2. Fine de la Antologio estas klarigitaj ĉiuj francaj frazoj, kiuj troviĝas en iu novelo. Unu, tamen, restis forgesita. Balkányi tion tuj malkovras! Kaj li riproĉas, ke la Antologio ŝajne oni faris por franclingvuloj. Jen objektiva riproĉo.

3. Pri la neologismoj. . .

Tamen, mi ne daŭrigas. Nian legantaron apenaŭ interesus mia disputo kun la Hungara Heroldo. Sed min vere indignigis tiu kritiko, eble pro tio mi estis tiel malbonhumora, ke mi rimarkis en la Esperanta gazetaro preskaŭ ĉie nur riproĉindaĵojn.

Espereb'le, mi riparos ĉi tion sekvafoje. Kaj espereble min helpos en tio bonvole ankaŭ la Esperanta gazetaro.

Georgeo Karczag

Recenzo

DU KLASIKAJ VERKOJ*)

1. *Oduseias* de Homeros. Trad. W. J. A. Manders ĉe Thieme & Kio Zulpfen, Nederlando. Prezo 3 fl. 90

2. *Infero* de Dante. Trad. K. Kalocsay ĉe Literatura Mondo. Ilustris D. Fáy. Prezo broŝ. sv. fr. 8.80, bind sv. fr. 11.—+10% por sendkostoj.

Subita kaj preskaŭ samtempa riĉiĝo okazis de nia literaturo: du el la plej grandaj epopeoj en la klasika civilizo estis tradukitaj, la Homera *Odiseo* fare de W. J. A. Manders kaj la Danta *Infero* fare de K. Kalocsay. Se oni memoras la tradukojn de la Virgilia *Eneido* fare de D-ro Vallienne, de la anonima *Rolandkanto* fare de D-ro Noel, de la *Biblio* fare de Zamenhof, oni vidas ke, krom la *Iliado* (Kofmann tradukis verse nur la 6 unuajn kantojn) kaj la *Nibelungenlido*, ni posedas nun grandan parton de la literaturo eposa. (Mi ne kalkulas ĉi tie kun la cetera tradukita *Sinjoro Tadeo*, de Mickiewicz, la parte tradukita Mirejo de *Mistral*, la netradukitaj *Perdita Paradizo* de Milton kaj *Jeruzalemo liberigita* de Tasso — ĉar ili estas pli artefaritaj kaj tro novaj por havi profundan influon sur la europa literaturo). Estas konkerero, kies gravecon oni ne povas troigi por la regula disvolviĝo de nia lingvo. Ĉar tiaj praaj verkoj influis ĝis nesupozebla grado la europajn literaturojn per siaj originalaj parolturoj kaj vorbildoj — ne menciante eĉ la rakontitajn scenojn, al kiuj aludoj svarmas en la modernaj literaturoj. Ĝis nun, kiam oni renkontis en teksto esprimon pruntitan de tiuj klasikaj verkoj oni devis peni por forgi per si mem tradukon iom taŭgan, kun la ĉiama timo, ke tiu traduko ne elvokos en la penso de la legantoj la originalan bildon; ĉar kompreneble ĉiu tradukisto povis uzi diferencon formon. Nenio estis pli malfacila ol transdoni ekz., e la la biblian stilkarakteron de Bossuet aŭ la homermodajn stilornamojn de Chateaubriand, ĉar ekzistis en Esp-o nek biblia nek homera aŭtoritata traduko. Zamenhof, korektita de la anglaj pastroj donis al ni la deziritan biblion; nun S-ro Manders donas al ni la duonan sed certe la pli interesan parton de la Homera verko, la Odisejon. (Mi opinias utila uzi tiun formon por distingi la nomon de la poemo elde la nomo de la heroo, se oni transskribas ĝin el la he'ena, Odiseo — latine: Uliso.) Li ne tradukis ĝin verse kaj mi ne mallaŭdas lin. Mi jam diris aliloke, ke la heksametro estas la plej facile gurdita verso en Esp-o kaj sekve la plej malfacila, se oni volas vere plaĉi al la orelo; ĝi estas en tia okazo tiel malfacila, ke mi dubas ĉu oni povus sen turmento al la teksto uzi ĝin por longa poemo. La provoj de Kofmann kaj de Vallienne cetera ne malpravigas min; kiu rekonas la harmoniajn, variajn, flekseblajn versojn de Virgilio en tiu mekanike skandita formo:

Ne esprimeblan, reĝino, vi petas novigi doloron,
Kiel Trojanojn potencon kaj regnon multege plorindan
Rompis Danaoj: malĝoja afero, en kiu mi prenis
Parton grandegan, kaj kiun mi vidis. Ĉar tion aŭdante,
Kiu, Mirmido, Dolopo, kruela soldato Ulisa,
Larmojn retenus? . . .

*) Pri ili ambaŭ ni publikikos ankaŭ apartajn recenzojn, el la plumoj de J. Hartog kaj B. Migliorini.

La traduko estas do proza; sed mi devas aldiri ke tiu prozo estas tie ĉi zorge ritmita, ke oni ne sentas troan bedaŭron; krome, la enhavo tiel ofte similas romanon, ke ne ĝenas legi ĝin en proza formo. Ĝi fluas facile, gracie, kiel bela purpura ŝtofo, brodita per belliniaj, oraj bildoj, kaj oni ĝuas vere infanan plezuron (almenaŭ mi konfesas tion) je la malrapida disvolvigo de la mirrakonto.

Sro Manders tradukis laŭ bone aranĝita teksto, kaj laŭ plej modernaj sciencaj informoj: tiu zorgo estas sufiĉe malofta en nia literaturo, por ke oni laŭdu ĝin speciale. Li konas eĉ la plej novajn hipotezojn: *atrugetos* estas ĉe li *senripoze ondanta*, kaj ne kiel ĉe la malnovaj tradukistoj (Kofmann): *senfrukta*. Nur kelkaj kritikoj ĉi rilate: *athopa oinon* (IX 36o kaj aliloke) estas *flamruĝa vino* (litere: *fajrovizaĝa*) ne *perlanta*. Por *tanupeplos* (XV, 364) la epiteto *malvastvesta* estas dubenca; pli bone: *striкта* (tio propre signifas, ke la virino estas agrable graspuŝeta, kaj bone plenigas sian veston.)

Laŭ la Homera modo, la kunmetitaj epitetoj abundas, ofte tre taŭge formitaj (oni rimarkas, ke la kelke oftaj triradikaj kunmetaĵoj transdonas bone per sia pezo kaj gravo, la arkajan tonon de la originalo): *Athene fajro-ŝprucokula*, *dutenilhavaj kruĉoj*, *doloreltenema koro*, *remŝipamaj Phaiakoj*, *urbruĝnigulo*, *nepereipovaj sandaloj* ktp. Okaze de tiu lasta, mi rimarkis plurajn similtajn kunmetaĵojn, kies unua elemento estas infinitivo; mi notas kelkajn por inciteti mian Kalocsay, kiu rifuzas al ili la «*ekzisti-raĵton*»: la *mortidevuloj*, *tranĉipova*, *defendiforto* (mi konfesas, ke mi ne vidas diferencon kun: *vivoforto* kaj *defendoforto*, kiuj troviĝas sampaĝe 264). La tradukisto taŭge uzis kelkajn neologismojn: *pojno*, *pubo*, *starti*, *trajektorio*, precipe pri la maraferoj: *braso*, *hiŝi*, *holdo*, *steveno*, *ŝkoto*, — sed li nekompreneble haltis antaŭ aliaj: li uzas ekz. *antaŭsteveno* anst. *pruo*, *trokuraĵulo* anst. *aŭdaculo* aŭ *temerarulo* (pli bone estus almenaŭ: *troriskemulo*). Precipe estas kritikinda la misuzo de la sufikso *ec*: *ruzecaj ligiloj* (88) *bonvolece* (74) *nebuleca maro* (59) *saleca akvo* (143) *nigreca vino* (59) *spertece* (54) *laneca mantelo* (80) *rokeca lthaka* (133) *ŝtoneca rokaro* (63) *graseca tero* (18); preskaŭ ĉie ĝi estas neŭtila kaj falsasence uzita; ĉar ĝi ne signifas abundon de io, sed la abstraktan similecon: laneca mantelo estas propredire mantelo el ia ajn ŝtofo alia ol lano, sed kiu havas ties aspekton aŭ proprajojn. Dum mi estas en la dornejo, mi signas la kelkajn erarojn pro senatento, kiujn konvenus korekti en dua eldono: *krudelulo* (= kruelulo 106) *turmo* (= turo 71) *pintlongaj* (= pintlangaj 54) *regulino* (= reĝino 69) *elementis al la kapo* (103, fr: monter à la tete = la kolero *levijis* al lia kapo, diras Kabe), kaj *Laodamantos* (= Laodamas 86) — Laŭ tre defendebla maniero, la aŭtoro transskribis ĉiujn proprajn nomojn kaj esperantigis ne eĉ la plej konatajn: *Herakles*, *Akhilleus*, *Homeros*. Ĉar li ne tradukis verse, kaj ne bezonis zorgi por montri al la leganto la ĝustan akcentadon, oni ne povas riproĉi lin, ĉar cetere tiu procedo donas helenan koloron al la rakonto.

Sume, malgraŭ la kelkaj kritikoj, kiuj vere estas tre malmultaj, rilate al la amplekso de la verko kaj ĝia stilriĉo, tiu libro estas unu el la plej plaĉaj tradukoj, kiujn mi konas en Esp-o. Kaj la ekstera formo de la libro, papero k preso, ne difektas la plezuron de la leganto. Serioza esp-isto ne povas malhavi tiun ĉefan libron en sia biblioteko, apude de la Zamenofa Biblio. Ili estas du verkoj, kiuj prezentas inter si pli ol unu similan punkton, kaj por nia lingvo preskaŭ egalan gravecon.

Egale grava, sed pro iom malsamaj kaŭzoj, estas la *Infero* de Dante.

Oni scias, sufiĉe, kiel la originalo estas stilstreĉa, kolorriĉa, vortabunda; kiel en ĝi svarmas la aludoj al ofte forgesitaj aŭ malbone konataj eventoj; kiel la ritmo estas nemalligeble implikita per la triobla ripeto de la sama ritmo. Dante estas la genio plej abrupta el la moderna literaturo; li staras en la dezerto de sia epoko, kiel obelisko en la egiptaj sabloj. Ataki tian giganton estis preskaŭ freneza penso; mi ne asertas, ke Kalocsay venkis, lin sed plej obstinaj skeptikuloj devos konfesi, ke li ankaŭ ne estis venkita. Kaj kiel Jakob el sia lukto kontraŭ la Angelo, li eliras el la batalo pli granda kaj pli forta.

Cetere, se la verko ne estas el la plej unuavide kompreneblaj, Kalocsay klopodis malgrandigi kiel eble plej la penon de la leganto. Malofte mi vidis tiel oportunan prezentadon de la Infero; kaj en la franca mi ne konas unu tradukon, kiu liverus al la publiko tian sumon da klarigoj, tiel malvaste resumitaj. Des pli prave en pli malgrandaj literaturoj, por kies anoj certe tiu libro estas la sola rimedo por facile orienti sin en tiu verkego. Mi signas speciale la skemojn de la Danta Infero (p. 96, 144 kaj 269) kiuj tuj komprenigas la iom komplikan planon de la damnita regiono. Ankaŭ la historiaj klarigoj ĉe la sojlo de ĉiu kanto estas tre bonvenaj, kaj en la biografio de Dante, kiu antaŭas la poemon, oni trovas ne nur bezonatajn informojn, sed ankaŭ altkvalitajn paĝojn. Kaj la neologismoj, kiujn uzis la tradukinto, estas klarigitaj jen piednote, jen en aparta listo je la librofino (rimarketo: spite al la signado, *lici* ne kuŝas en la SAT-vortaro, sed ja *neglekti* kaj *vito*). Tie oni vidas, ke, krom ok terminoj, ĉiuj aliaj troveblas aŭ en la SAT-vortaro aŭ en la Parnasa Gvidlibro: tio pravas interalie, ke la vortoklekto, kiun mi liveris en tiu lasta libro, larĝe sufiĉas por la plej malfacilaj verstradukoj, kaj krom maloftegaj esceptoj, ne multigos jam: konsidero kiu eble trankviligos bonajn animojn verŝajne skandalitajn de la supozo, ke Esp-o estas ĉiujare riĉigonta po ses cent neologismoj. Kaj aliflanke tiu verko pravas al la hontemaj kondamnintoj de la »*Poezia Fekvortaro*«, ke la abomenaj vortoj kiel *kopuli*, *merdo*, *meretrico*, *pugo*, *puo*, *putino*, povas esti uzataj en la poezio, kaj eĉ en la plej altinspira poezio. Mi esperas, ke ili ne akuzos Dante pri malĉastemo. Jan la legado de la *Alta Kanto* (precipe en 7, 2) aŭ de *Jehezkel* (precipe en 23, 20) estus devinta averti ilin. Sed plej ne kuraceble surda estas, kiu ne volas aŭdi.

La de Kalocsay provitaj 8 novaj vortoj cetere ne apartenas al tiu lasta kategorio. El ili 3 estas preskaŭ truditaj de la teksto (armento, drudo, perisomo) kaj apenaŭ estas uzeblaj aliloke; el la aliaj, rimarkinda estas nur la provo de la sufikso -esk, kun signifo: simila al, samaspekta kiel . . . (fereska ŝtono); mi tre dubas pri la akceptebleco de ia ajn nova gramatika ilo, sekve ankaŭ de tiu afikso; tiom pli, ke -ec povas sufiĉe taŭgi por esprimi tiun ideon. Kiel stilan apartaĵon mi notis la fortefektan forigon de la antaŭaĵo de relativo, en versoj:

mi falis, kiel kiun sveno ĵugis . . .
(vojo) pli kruta ol kiun ni postlasis . . .

Pri la uzo de *se* . . . u kun optativa signifo, Kalocsay diras mem, ke ĝi ne estas enkondukenda en la literaturon; ĝi restos nur imito de la Danta stilo.

Estus iom insulte al Bleier miri antaŭ la severgusta, sobrastila prezentado de la libro; li kutimigis nin al tiaj belajaĵoj. Sed mi povas diri, ke neniam li tiel perfekte sukcesis. Kaj la elekto de Dezső Fáy por ilustrila poemon, estas kiel eble plej laŭdinda. Tiuj, kiuj ellegis la Dantan poezion,

kaj iom spertas en la libroarto, scias, ke Dante same kiel Baudelaire — kvankam ne pro la samaj kaŭzoj — estas aŭtoro ne ilustrebla laŭ la klasika maniero. Ĉia ajn provo por realigi per la desegno la scenojn imagitajn de la poeto estas vana kaj malinda. Nu, Fay lerte evitis la malfacilon: ĉiu el liaj lignogravuroj estas dividita en multaj apudmetitaj fakoj, prezentantaj ĉiuj apartan scenon: la unuiga moto estas la paro Vergilio-Dante, malsuprenirantaj la eternajn ŝtupojn. Dank' al tiu procedo, la dekoracio kaj ĉiuj nedoneblaj detaloj estas forigitaj, la personoj estas traktataj iom skeme kaj des pli dras'e, kaj la efekto pri svarmado estas nerezigbla: per la ŝajne kosa aranĝo ĉiu tabulo donas al la okulo la impreson pri sonĝa scenaro, pri inkubvizio, kiu respondas admirende al la apudteksto.

Finante la recenzon, mi rimarkas ke mi ne parolis pri la traduko mem. Sed kion diri? Kalocsay . . . estas Kalocsay kaj mia amikeco al li farus flataĵoj plej sincerajn konstatojn. Tamen mi povas montri al la belamantoj, kiel preskaŭ perfektajn pecojn, la lamenton de Franĉeska (kanto 5a) la alegorion de la Fortuno (k. 7a), la tragedion de Ugolino (k. 33a), sed precipe la finon de la 26a kanto, tiun korpreman morton de Uliso, sur la rompita ŝipo, kiu simbole forportas la antikvan mondon al abismo. Nenio pli granda ekzistas en ia ajn literaturo.

G. Waringhien

*

ELDONAĴOJ DE HEROLDO de ESPERANTO, Köln

DOUGLAS P. BOATMAN: LA NEKONATA KONATO. 122 paĝoj. Heroldo, Köln, 13.5×20 cm 124 pg. Prezo, broŝ. 1.60, bind 3.— Mk. g. Plus 10% por sendkostoj.

Sincere mi konfesas, ke la mistikaj, aventuraj aŭ detektiv-romanoj ĉiam altiris min: tiom pli granda estas mia peko en la okuloj de la snoboj, ĉar pro ĉi tiu inklino mi eĉ ne hontas, neniel mi sentas min degradita homo, se tian libron mi prenas en la manon. Necesas kompreneble, ke la aŭtoro konu sian metion: facila, vigla stilo, teknikaj rafinaĵoj, iom da inteligento estas kvalitoj, kiujn ĉe tiaspecaj romanoj oni ne rimarkas — se ili ĉeestas, sed ilia manko tuj ĝenas, kelkfoje ĝis la al-mur-jeto.

Nu, la violkolora, malhela kovrilo de la *Nekonata Konato* tuj vekas la interesigon, ne parolante pri la titolo, kiun mi trovas vere feliĉa. La subtitolo sonas: mistera rakonto, kaj la mistero komenciĝas jam sur la titolpaĝo: ni ne povas diveni, ĉu originala aŭ tradukita libro kuŝas antaŭ ni. Tiu unua mistero iom mishumorigas, sed poste oni komencas foliumi la libron kaj . . . oni ne formetos ĝin antaŭ plena ellego. Tia sugestiva forto tia nektraŭstarebla toronto de okazajoj, tia pliiĝanta streĉo de viziaj bildoj ekkaptas la fantazion de la leganto, kian ne ofte oni trovas en la poramuza literaturo. Pri la temo de la libro mi kompreneble ne parolas, simple mi rekomendas ĝin, certe neniu pripentus la legon. Mi aldonas nur, ke la misteraĵoj tute ne estas fantaste kaj neverŝajne amasigitaj unu sur la alian: la plej fortan efikon la aŭtoro atingas ĝuste per tio, ke la mistero ekfloras el la grizaj okazajoj de la trankvilaj, pacaj semajn-tagoj.

Ŝajnas al mi, ke en la ventfrappe rapida, glata, agrabla, rutina, facila stilo eble tie kaj tie ĉi troviĝas makuleto: ŝajnas al mi, sed mi ne scias! La libro tiel forte kaptis min, mi tiel avide glutis ĝiajn paĝojn, ke mi ne povis atenti pri tio.

Vere mi tre ĝojus, se mi aŭdus, ke ĉi tiu libro apartenas al nia originala literaturo.

EL CORONEL IGNOTUS: LA AMO EN LA JARO DEKMIL. El la hispana: José Fernando Berenguer. 352 paĝoj. Eldonejo: Heroldo, Köln. Formato 13,5×20 cm. Prezo: broŝ. 2.80, bind. 4.40 mk. plus 10% por sendkostoj.

Utopio el la speco de la science fantastaj romanoj. Tempo: la centa jarcento. Kadro: juna paro, gefianĉoj, en la XX-a jarcento subite dronas en mortsimilan staton, kiu tamen ne estas morto kaj kiu konservas ilin por la dekmila jaro, en kiu ili revekiĝas. Tra iliaj okuloj ekkonas la leganto la teknikajn miraklojn (cetere ne tre diferencajn de tiuj, kiuj legeblas en aliaj utopioj) kaj la socian mizeron de ĉi tiu fora estonto. La surfacon de la tero loĝos du milionoj da »superpensantoj« t. e. la regantoj de la tero, ĉiuj milionuloj, kaj sub la tero loĝas kaj laboras tri mil milionoj de parioj, inter la plej mizeraj cirkonstancoj. (Inter parentezoj: la sociologio ne estas forta flanko de la eminenta aŭtoro, ekzemple kiu konsumas la gigantan kvanton de produktajtoj, kiujn la laboro de la parioj rezultigas? Nenia respondo. Same ĉe la fino, kiam la superpensantoj kaj parioj repaciĝas kaj la parioj venas al la surfaco, la aŭtoro simple prisilentas la kielan solvon de la problemoj.)

Certe estas originala kaj interesa ideo la ĉefmotivo de la libro: la transformo de la ama energio je elektra, kaj ĝia utiligo por industriaj celoj. La verkisto kun videbla prefero okupas sin per la priskribo de la ĉi rilataj teknikajtoj, tio ja ne estas mirinda, li estis eminenta scienculo. Nur la leganto iom ĝojus, se li estus bridinta kelkloke ĉi tiun sian preferon . . . Tamen entute la libro estas interesa, la sceno, kiam Marcial malhelpas la forraban de la filo de Cartoya, ne senas dramecan streĉon.

La lingvo de la traduko estas bona Esperanto, estas laŭdinda la lerteco, per kiu la tradukinto venkis la malfacilaĵojn prezentitajn per la teknikaj partoj. En la antaŭparolo la tradukinto diras: »mi evitis multajn ne nepre necesajn neologismojn«. Nu, la libro celas amuzon, ĝi havas tute simplan, mi povus diri, grize ĉiutagan stilon, do eĉ ne estus motivita la uzo de multaj neologismoj. Krome eĉ troviĝas en la libro kelkaj neologismoj, kiel *ampolo*, *gracila*, *fugi*, kiuj ne estas troveblaj en la klariga listo ĉe la fino de la libro. Do mi tute ne povas kompreni, kian sencon havas la troa akcentado de la rolo de »bona knabo«?

L. Totsche

JOSEPH SCHERER: CIRKAU LA MONDON KUN LA VERDA STELO. (Eld. Heroldo de Esp. Köln, 272. p. Prezo: RM 4.— broŝ. 5.6) bind. Plus 10% sendkostoj. 13.5×20 cm.

Antaŭ ĉio: ni sensaĝe subskribas tion, kion s-ro Robert Kreuz skribas en la antaŭparolo de la libro pri la graveco de la Scherera mondvojaĝo. »Li atestis ne nur la grandan devastigon de la helplingvo Esperanto: li ankaŭ provis ĝian utilecon. Kaj realiginte . . . la mondvojaĝon, li plenumis aktualan postulon de la publika opinio: montri Esperanton kiel faktoron de l' praktika vivo interpopola.« La belaspekta libro estas grava dokumentaro de tiu signifplena entrepreno: ofte ni trovas eĉ informojn el kiuj ni povas konkludi pri la stato de la diversaj naciaj movadoj. — Kiel dokumentaro la libro absolute taŭgas. Kiel literaturaĵo? Dum la legado mi provis uzi la metodon de la detektivoj de la »kajerromanoj«; kiam la fama detektivo vidis figuron kun granda barbo kaj lipharoj, tuj li provis imagi la saman figuron sen barbo kaj lipharoj kaj konkludi pri la »polica« vizaĝo. Nu, ankaŭ mi uzis la saman manieron. Ankaŭ mi provis senigi la libron de la

esperantistaj barbo kaj lipharoj kaj pensis pri tio, kion mi dirus, legante la saman libron, kiel geografian priskribon en nacia lingvo. Kaj mia konkludo ne ĉiam estas favora al la verkisto, kiu donis al ni ne harmonie egalvaloran verkon. Kelkloke li vidas akre kaj per kelkaj koncizaj vortoj donas karakterizan priskribon, aŭ klarigon de situacio, kiun ni antaŭe certe ne vidis tiom klare, ekz. kiam li prezentas Ĉinuĵon, kaj per tiuj partoj li malkaŝas tre atentindan ĵurnalistan talenton, sed male mi trovis multe da lokoj kie la aŭtoro aludis pri misteroj, aŭ »etoso«, kiujn li laŭ sia aserto komprenis, sed bedaŭrinde mi ne komprenas, ĉar li preterlasis sciigi ilin al la leganto. Eble li volas esti konciza kaj tiamaniere perdiĝas la esenco, kiu nin vere interesas krom la tre gravaj dokumentoj de la esperantista flanko, la spirito de la lokoj, homoj, la aromigo de la priskriboj. Mi supozas, ke la aŭtoro, kies ĵurnalista talento estas ne kontestebla, povus kaj povos doni tian kompletigon de la libro, kiu absolute kontentigos nin, kie ni trovos ĉion, kion nun ni povas nur konjekti. La kuraĝa kaj valora entrepreno kaj ne malpli la talento de la aŭtoro postulas tiun duan verkon, kie li kolorigos tiujn bildojn, kiuj certe pro teknikaj kaŭzoj nun restis senkoloraj. La lingvo estas flua, facila, korekta; tamen iom mi pridubis min mem, kiam mi ekvidis la vorton: »nubgratulo« kaj momenton mi pensis pri iu moderna poezia bildo, nur poste mi povis ekvidi la sufikson »ul«, kies aplikon mi el du vidpunktoj ne povas aprobi en tiu ĉi loko: unue ĉar mi ne ŝatas la alian objektulon la »trimastulo«-n kaj due, ĉar la »koincido faris vorton dubosencaa.« Mi preferus la formon nubgratanto, aŭ nubskrapanto. Belaj, variaj fotoj kompletigas la libron, kies eksteraĵo ne estas malpli plaĉa, ol ĝenerale la enhavo, pri kiu ni havas tre bonan opinion malgraŭ niaj riproĉetoj, kiuj signifas nur niajn pretendojn kontraŭ la talenta aŭtoro.

Szilágyi.

DE KONGRESO AL KONGRESO (kongresa jubilea libro, eldonita okaze de la jubilea kongreso de Esp. Köln, 77, p. prezo: GM 1.—) Bele ilustrita, metale kovrita memolibro de la pasintaj 25 kongresoj, kies raportantoj plejparte bone komprenis la tendencon de la libro kaj preterlasis la elementan kritikon de la diversaj kongresarangajoj. Por ni ĉiuokaze la enkonduka traktato de Behrendt pri Zamenhof, la poeto, estas la plej interesa, la prezidanto de la kongreso kaj la nomumita gvidanto de la nuna germana Esp. movado tre interese kaj trafe analizas la poetan individuon de la majstro kaj kelkaj tre interese lumigas la personon de la aŭtoro, kiu ne povas esti ne simpatia al objektive pensanta homo. Ne estas eble nun detale konigi la traktaton, mi volas nur kompletigi la rimarkojn de la aŭtoro per du rimarketoj; la unua estas atentigo pri la dua strofo de »Mia penso«, kie la animluktado de Zamenhof senpere prezentigas, (tion cetere akcentas ankaŭ Behrendt), kaj mi devas akcenti, ke neniam antaŭe kaj neniam poste Z. tiom multe povis montri el si; en tiu strofo estas la volo de la homo, kiu devas esti forta kaj kredema, sed kiu sentas sin iom malgranda kaj malforta en la ombro de la ideo, kies peranto li estas kaj kiu batalas finfine kun la ideo mem: »Fajron sentas mi interne — Vivi ankaŭ mi deziras... Io pelas min eterne —« ĉu ne impresas nin tiuj kelke da vortoj, kiel la plej sekreta disputo de homo kun si mem. Kaj tiu animluktado, tiu disputo aperas ĉe Zamenhof ankaŭ aliajn fojojn, eble ne en tiom konkreta formo, sed ĝi enŝovas sin en poemon, kie li konfesas pri la unuiga forto de lia kredo: »Ho, kiu ajn estas vi, forto mistera,« —

ĉu ne estas tio subkonscia sono el la ateismo de la 15 jara Zamenhof, kiun influis la patra senkredemo, kaj tiu influo aperas en la poemo, en kiu Z. volas solene konfesi la kredon, kion li sopiras kaj kiu finfine venkis en lia animo. Szilágyi.

EMMA L. OSMOND »TRAVIVAJOJ DE KIKI II.«; M. KLOSE-P. BRÖTHER »PRI RUBEZAHIL« (Ambaŭ el la Esp. Junula Biblioteko. Eld. Heroldo de Esp. Köln. Prezoj: 0.25 Mk.) — Tiuj volume'oj estas tre gravaj verkoj en nia malriĉa infanbiblioteko. La ĉarmaj aventuroj de Kiki kaj la allogaj fajroj de la montospirito, kiu estas ege provizita de socia sento, do ambaŭ verkoj ŝajnas esti bonaj edukio'oj, ĉu el lingva, ĉu el morala vidpunkto. El la du libretoj la lasta havas eĉ pli simplan stilon. Szilágyi.

*

ANDRES PINO »KONSILOJ«. (Eld. Tip. Moderna — Valencĉa. — 56 paĝoj. La aŭtoro nomas sian libron: »sugestoj de malnova Esperantisto«. En la libro estas kolektitaj la riproĉoj kaj kritikoj pri la movado kaj oni ne povas nei, ke la aŭtoro plejparte pravas. La movado sentas la ĝeneralan krizon, sed kelkfoje ni havas la senton, ke trans tiu ĉi krizo ni havas ankaŭ pli specialajn malbonojn. Eble ni, la gravmienuloj ne pravas, sed neniokaze malutilas, se ni metas la manon al la vejno de la movado, por senti ĉiun malordon en la sangocirkulo. La rimedoj, kiujn la aŭtoro proponas parte estas tute interesaj, sed parte ne realigeblaj, ĉar ili signifas iom tro familian spiriton en la movado, kiu eĉ nun ekzistas kaj ofte donas provincan karakteron al la movado. Ekz. malgraŭ tio, ke temas pri la intereso de nia gazeto, mi ne kuraĝus postuli de la aliaj Esp. gazetoj, ekz. de Heroldo, ke ĝi, aŭ ili absolute ne aperigu literaturaĵojn. Sed certe estas absolute sekvenda lia konsilo, ke la naciaj societoj laboru senĉese por varbi naciajn eminentulojn, ĉar tiuj eminentuloj influos la registarojn por la favoro de Esp. — Mi mem, kiu vidis jam sukcesojn kaj fiaskojn en tiu rilato, povas aserti, ke en tiu ĉi rilato la Esperantistojj ŝuldas multege al si mem. Atentinda verko. Szilágyi.

NAUM JERUSALMI. Merkado la azenpelisto. Romano. El la hebrea lingvo tradukis Levi Wiener (Leono Vienano). Eldonejo N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8. 140 paĝoj. Prezo sv. fr. 1.80 + 10%

La t. n. »sefardaj« judoj, vivantaj en la suda Eŭropo kaj la proksima Oriento, grave diferencigas de la t. n. »aŝkenazaj« judoj, kiuj vivas en la cetera Eŭropo kaj en Ameriko. Dum la aŝkenazoj en la daŭro de longaj jarcentoj sukcesis alproprigi al si la kulturon okcidentan, kiun ili en alta grado kunhelpis konstrui, la sefardoj — cetere la malpli granda parto de la juda popolo — multloke konservas ankoraŭ la morojn, kutimojn kaj primilivan vivnivelon de la orientaj popoloj. Nur lastatempe, dank' al la reviviĝinta nacia juda vivo en Palestino, ankaŭ la sefardoj rapide kulturigas. plifortigante kun la aŝkenazoj la kontakton, kiu dum longa tempo ĝis nun estis grave neglektata.

Per tre interesaj priskriboj de la sefardaj moroj la konata hebrea verkisto Naum Jeruŝalmi plektis sian romanon. Kvankam la kanvaso estas sufiĉe ŝablona (idilio de du amoplenaj junaj koroj), la lerta plumo de Jeruŝalmi kapablis rafini ĉi tiun simplan rakonton ĝis ĝuinda romano, nepre rekomendinda eĉ al la plej kribrema leganto. La medio, en kiu okazas la

agado de tiu rakonto, aldonas al la libro plian fascinon kaj ĉarmon.

Leo Wiener, kiun la esperantista publiko konis ĝis nun sole laŭ lia pseŭdonomo Leono Vienano, jam multfoje pruvis sian tradukistan talenton kaj bonegan lingvouzon. Ankaŭ ĉi-foje li prezentis al ni bonan verkon en bona traduko. Li lerte venkis la diversajn malfacilaĵojn, kiujn ofte kaŭzas la tradukado el la klasika hebrea lingvo. Cetere lia Esperanto-stilo estas vere modela (kiel s-o Wiener mem diras en la antaŭparolo, li evitis ĉiujn neologismojn superflujajn kaj malutilajn al nia lingvo — sed tio nur signifas, ke ekzistas ankaŭ neologismoj necesaj kaj utilaj, do kiuj ili estas?). Tamen kelkajn malĝustaĵojn mi trovis en la traduko: s-o Wiener tro ofte uzas la vorton »unika« anstataŭ »sola« aŭ »unusola«, laŭ mi »unika« havas pli precizan signifon, »ankoraŭ« anstataŭ »jam«, »prosperi« anstataŭ »sukcesi« — sed tio neniel malgrandigas la valoron de lia bonega traduko.

I. Lejzerowicz.

BUDAO. Eljapana traduko de la unua ĉapitro de skribita originale en Angla lingvo verko: Esenco de Budaismo (de P. Lakṣmi Narasu). Tradukinto: Takeŭĉi-Tookiĉi. Eldonis: tradukinto, Jamaŝiro-Maĉi Iŝikaŭaken, Japanujo. 11×15 cm. XIV+42+7 paĝoj. Prezo broŝ. 0.50, bind 2.— mk.

La libreto lerte kaj edife konigas la plej ĉefajn trajtojn de budhismo kaj la vivhistorion de Budho. Krome ĝi enhavas kelkajn belajn fotografiaĵojn pri Budho-skulptaĵoj kaj pentraĵoj kaj aldone partetojn el Darmapado kaj Diga Nikaja. (Ambaŭ libroj estas verkoj el la Ceylon-a pali-kanono).

Estas malfacila afero recenze pritrakti erarojn de traduko de scienca aŭ scienc-aspekta verko, ĉar kelkkloke (kaj ĝenerale ĉe gravaj partoj) oni ne scias: kiun respondi pro la eventuale trovitaj eraroj. Tamen ekzistas elkonduka vojo (kvankam iom duba): la recenzisto respondigas la tradukinton; unue, ĉar li estas pli proksime trafebla: due, ĉar kial li elektis tian materialon; trie, ĉar se li jam tion faris, kial li ne transverkis la originalon: unuvorte: ĉar la tradukinto estas ĉiam almenaŭ kunkulpinto.

Recenzante tiun ĉi verketon, ankaŭ mi devis elekti la supre menciitan vojon. Tion mi faris kun konscienco tiom pli trankvila, ĉar ege verŝajnas, ke temas pri misaĵo de l' tradukinto mem.

»Budao ne parolis arogante« — legeblas sur la 4-a paĝo, — »ke li estas tiu, kiu transdonas favorplenan revelacion de supernatura potenco al homoj...« Pri Kristo estas ĝenerale sciite ke li diris tiaĵon, tial mi trovas la vorton »arogante« iom forta. Sed Kristo nur laŭ la Biblio parolis tiel. Do, se ni lin rigardas laŭ tiu ĉi vidpunkto, ni devas sammaniere agi pri Budho. Ni vidu ekzemple, kion diras la sanskrita »Lalita-vistara« kaj la pali-a »Maĝhimanikaja« pri la naskiĝo de Budho: »...la embrio tiam elpaŝis dekstre el la utero de sia patrino... kaj aŭdigis la *sinhanad*-on (leokriego): »Mi estas la plej unua en la mondo mi estas la plej granda en la mondo, jen estas mia lasta naskiĝo. Mi finas la suferojn de la naskiĝo, maljuno, kaj morto.« Nun, aŭ ni akceptu la kanonon ĝusta ankaŭ ĉe Budho, aŭ ni forjetu ĉiun legendajon.

La dua afero troviĝas sur la 18-a paĝo, kaj rilatas al la traduko de l' fama Budho-citaĵo; videbla sur preskaŭ ĉiu budhismaĵo (memorobjektoj, preĝ-radoj, ktp.). »Iaj ajn aferoj devenas de kaŭzo, Ilia kaŭzon klarigis Budao. Kaj tion, kio estas ilia *estingiĝo*... « La malbone uzata »-iĝ-« falsas la tutan enhavon kaj sencan de la budhismo, ŝajnigante ĝin mondri-

gardo tute neaktiva, ni diru, kontentiganta per la nura observado de la aferoj. Kiu nur iom konas la budhismon, vidas la sensecon de tio. La sola ĝusta traduko povas esti (kaj estas) »... Kaj tion, kio estas ilia *estingo*...« (Ĉu granda krio pro nenio?)

La stilo kaj lingvo estas bedaŭrinde ankaŭ krom la supre menciitaj aferoj sufiĉe atakeblaj. Ankaŭ la tradukinto sentis tion, eĉ li skribas ĉirilataĵojn en sia »Postparolo«. Mi tamen ne sentas min absolvita pri denombro de la plej gravaj stilaj kaj gramatikaj eraroj. (La unua cifero markas paĝon, la dua linion. a. legu *anstataŭ*).

1. Malbona aŭ erara vortordo: 5,3 (»nek mi estas ĝi« a. »nek ĝi mi estas«); 5,4 (»nek mi estas homo« a. »nek homo mi estas«); 29, 19 (»lia unu vorto« a. »unu lia vorto«)

2. Malbonaj vortoj: 1, 17 (»alia krom« a. »alia ol«); 5, 22 (»nenio alia krom« a. »nenio alia ol« aŭ »nenio krom«); 7, 21 (»ellasi sin« a. »sin savi« aŭ »eskapi«); 10, 18 (»krom« a. »ol de«); 18, 12 (»paroli« a. »diri«); 18, 18 (»ambaŭ« a. »du«); 34, 15 (»diri« a. »paroli«);

3. Superfluaĵaj vortoj: 2, 14 (»krom tio instrui« a. »krom instrui«); 18, 23 (Tiu); 34, 14 (Li);

4. Superflua ripetado de prepozicioj: XIII, 18; 3, 7, 7/2, 19;

5. Superflua akuzativo: 11, 7;

6. Manko de akuzativo: 2, 7; 8, 7—8; 8, 23; 15, 22; 17, 4; 32, 21;

7. Manko de pluralo: XII, 9; 14, 2; 14, 5;

8. Uzado de »unu« kiel nedefinita artikolo: multfoje.

Ankaŭ la esperantigo de la propraj nomoj ne ĉiam estas kontentige solvita. Antaŭ ĉio mi riproĉas la vorton »budao«. La aŭtoro skribas en la antaŭparolo, ke li motivis sian preferon al ĉi tiu formo en artikoloj japanlingvaj en la Revuo Orienta. Nu, mi ne konas ĉi tiujn artikolojn, sed mi vere ne povas imagi, kiel estis eble motivi ĉi tiun preferon. Laŭ mia opinio la esp-a formo de la sanskrita *Buddha* doniĝas per si mem: se ni ellasas la duoblan *d*, restas *Budho*, perfekta esperanta vorto, havanta la avantaĝon, ke el ĝi oni povas plu formi *budhismo*, *budhisto*, vortojn konformajn al la internaciaj formoj. Se franco aŭ italo ne povas elparoli la sonon *h* post konsonanto, li povas ĝin sentigi per la mallongeco de la *u*-vokalo kaj per iom da paŭzo post la *d* (elparolo cetere konforma al la sanskrita: *budh'o*). La nekonsekvencecon de la tradukinto plej bone montras la esperantigo de la du nomoj *Buddha* (*Budao*) kaj *Anuruddha* (*Anurudo*). Devas esti: *Budho* kaj *Anurudho*.

La esperantistigo okazis plejparte el la sanskrita formo, sed tamen enŝovigis ankaŭ paliismojn, kelkloke eĉ miksite kun sanskritismoj. Ekzemple la nomo *Arada Kalama* estas vera kentaŭro: duone sanskrita (*Arada Kalapa*), duone palia (*Alara Kalama*).

En *ĵateti*, *Maha-prajapati* la literon *j* mi anstataŭigis per *ĝ*, pli konforma al la originala fonetiko.

Multaj sanskritaj vortoj ne estas klarigitaj, ekzemple *atman* (individua animo), *samgo* (eklezio de Budho). Ĉu eble la tradukinto cedas ĉi tiun taskon al la recenzisto?

Entute tamen valora libreto, kiu meritas esti legata.

Georgo Karczag.

LA LIBRO-KONSTANTAJO DE FILA PIECO. Esenco de la praktika etiko de konfuciismo. El la ĉina originalo tradukis: Kiuiĉi Nohara. 23 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto.

La kajero enhavas moralajn instruojn de Konfucio. Troviĝas en ĝi interesajoj ankaŭ por nuntempulo, ekzemple: »Antaŭ ĉio, niajn korpojn — trunkon, membron, eĉ haron aŭ parteton da haŭto — ni ŝuldas al niaj gepatroj, kaj ni devas esti sufiĉe zorgemaj nek difekti, nek malfortigi ilin: ĉi tie komenciĝas fila pieco. Nian personecon ni devas perfektigi, nian principon ni devas praktiki, por ke ni altigu nian renomon en la venontaj generacioj, kaj per tio ni glorigu niajn gepatrojn: ĉi tie kompletiĝas fila pieco.«

La lingvo de la traduko estas legebla, sed ne tre bona.

L. T.

LA VOJAGOJ DE GULIVERO. Unua parto: Vojaĝo al Liliputlando. Esperantigis: Jos. A. De Roos. 112 paĝoj. Eldonejo: Piet Smits, Tilburgo. Prezo: Guld. 1.25.

La celon de tia porjunulara eldono de la mondfama verko mi ne komprenas. Ĉiu knabo ja konas ĝin en sia gepatra lingvo, do ĝi ne povas servi kiel allogaĵo por junaj esp-istoj. Tiun celon plej efike servus originalaĵoj, kiuj prenas sian temon el la esp-a vivo kaj kiuj kapablas turni la romantikeman fantazon de la junularo al ĝiaj aventuraj ebloj. Manke de tiaj originalaĵoj oni publikigu tradukojn, la nacilingvaj literaturoj ja certe ampleksas multajn modernajn porjunulajn librojn, kiuj meritis tradukon. Kaj, ĉar ili ne estas tiel vaste konataj, ili certe vekus interesigon. Plena eldono de Gulivero (por plenkreskuloj) jam estus alia afero: ĝin ĝoje salutas multaj, kiuj ne povas ĝin akiri en la hejma lingvo, kaj nia literaturo riĉiĝus per unu el la plej valoraj »homaj dokumentoj«...

La libron esperantigis Jos. A. De Roos. Sed el kiu lingvo? Nia literaturo estas jam sufiĉe serioza por ne plu toleri malkompletajn esperantigojn, aŭ tradukojn faritajn ne el la lingvo de la originalo. La esperantiginto evidente volis doni legajon por ekzercado en la lingvo, tiam pli estas riproĉinde, ke la lingvo de la libro ne estas senerara. Jen kelkaj rimarkoj. Abundas superfluaĵaj malsimplaj verboformoj. »Por eviti, ke mi devus dormi« — la kondicionalo uzurpas la lokon de la u-modo. *Akurata, returniro, ruli, multpezo, enloĝanto, bandajo, returni, distrigi, amuziga, mi ne eblis, ĝies (!!)* malĝuste estas uzataj anstataŭ *preciza, reiro, ruliĝi, pezo (aŭ pezezo), loĝanto, bandajo, returni sin (aŭ reveni), distri, amuza, al mi ne eblis, ĝia*. Post »kvazaŭ« kiel konjunkcio malĝuste uzatas indikativo. Ĝin oni povas uzi nur post la adverba »kvazaŭ«, la konjunkcio nepre postulas kondicionalon. Je la amo de Dio mi petas niajn holandajn samideanojn, ke ili rezignu pri la idiotisma esprimo: »mi neeble povas«; ĉu ili ne povus kontentiĝi pri »mi ne povas« aŭ »al mi ne eblas«? Mi legis la jenan netan frazon: »Ili ne tion faris tutkore.« Nu, tio signifas, ke ili *ne tion*, sed *ion alian* faris tutkore, kvankam la senco de la originala teksto evidente estis: »ke ili ne faris tion tutkore.« Simplaj aferoj, ŝajne malgravaj, sed el tiaj malgravajoj ja konsistas la bona stilo kaj la »spirito de la lingvo.«

Ludoviko Totsche.

GEORGO BASTJEN: LA LIBERECANA SOCIO. (El la franca: A. Ozre. Eld: SAT Eldona Fako Kooperativa, Paris, 54 p. Prezo: 60 gmk.) Libro, kiu estas interesa pro sia ŝajna malaktualeco. La liberecana socio-

sin bazas sur la ekvilibro kaj harmonio de la diversaj asocioj de la intereso, sen la kodigo de la interrilatoj. La motivoj estas preskaŭ ne gravaj, ni scias, ke la ideo estas kaj estis plaĉa. Sed ĉu la homo estas jam sufiĉe forta, sufiĉe memstara, sufiĉe komunema estajo por la perfekte libera socio? Niaj pensoj ŝvebas inter la sopiro kaj la amaraj faktoj. Unue devas naskiĝi la nova tipo de la homoj kaj tiam naskiĝos nova sociordo. Kaj la novan tipon kreas la sento de la nekontenteco, kiu brulas en la nuna homo. Ni preparu nin. — diras la aŭtoro kaj niaj posteuloj atingos iam la Idealon. — Bona traduko, facila lingvo.

Szilágyi

JAKOB ROSENBERG: SOCIETA LUDARO. Eldonis la aŭtoro, Tallinn. 48 p. Prezo: 0.60 sv. fr.

La libreto enhavas kvindekda interesaj societaj ludoj, kiuj estas bone uzeblaj dum esperantistaj kursoj kaj kunvenoj. La ludoj estas amuzaj kaj spritaj, lingvo kaj stilo bonaj. La ludantoj povas bone ekzerca la lingvon. Rekomendinda verketo, precipe por daŭrigaj kursoj. *T. Czitrom.*

HENRIKO FISCHER, GALATZ, L. K.: LA FABELO PRI LA GRANDA TURO KAJ LA MALGRANDA DOKTORETO, SEKVATA DE ALIAJ KONVINKIGAJ RAKONTETOJ. 24 paĝoj. Biblioteko de la propagandisto. Eldonejo de la Esperanto Centro Rumana. »Oni presis por kelkaj samideanaj amikoj 99 ekzemplerojn de tiu libreto en luksa eldono, numeritaj kaj subskribitaj per la verkisto mem.«

Kiel unua numero de tiu ĉi nova entrepreno aperis la kolektitaj verkoj de s-ro Henriko Fischer. La leganto de ĉi tiu verkaro ĝoje retrovos la historion: »Kiamaniere mi fariĝis esperantisto«, ĉi tiun perlon de la propagandista literaturo. La lasta fabelo temas pri neologismema poeto. Estas karakterize kaj revelacias multe el la subkonsciaj sentimentoj de l' aŭtoro, ke por tiatema novelo li povis trovi, kiel ununuran *happy end*: la morton de la neologismema poeto. Tamen la eminenta ortodoksulo permesu al mi maltrankviligan demandeton: kio okazos, se la poemoj postvivos la poeton?

L. Totsche

ROBINSON KRUSO. (Simpla Historieto por komencantoj. Adapto de Kervran. Eld. Esperantista Centra Librejo, Paris. 12 paĝoj. Prezo: 1.— fr. fr.) Simple rerakontita skiza enhavo de la romano de Defoe. Konvena legajo por kursoj.

Szilágyi.

EINAR DAHL: Dialogoj kaj Komeditoj. (Eld. Societo Esp. Stockholm, 31 p. Prezo: 0.50 Kr. sv.) — Post la elĉerpiĝinta unua serio nun aperis la dua serio de la Dialogoj. La libreto enhavas plejparte tre bonhumorajn, facile prezentablajn kaj facillingvajn teatraĵetojn, kiuj pro la supre menciitaj kvalitoj estas bone uzeblaj en la grupa vivo kaj bone servas, el pedagogia vidpunkto.

Szilágyi.

A. SCHNEIDER — M. CARLSSON: Barbro kaj Eriko. (Eld. Societo Esp. Stockholm, 40 p. Prezo: 0.60 Kr. sv.) Aŭstra junulo kaj sveda junulino korespondas kaj en la leteroj aperas priskriboj pri la du landoj kaj kompreneble el la longa korespondado ne nur la leganto, sed ankaŭ la korespondantoj havas plezuron. Baldaŭ Eriko venos al Svedlando kaj poste ni povos gratuli al la plej nova internacia paro. La letera romaneto servas

al pedagogia celo kaj pro la plejparte absolute facila, flua stilo, ili ankaŭ trafas. Rekomendebla kursa legaĵo. Szilágyi.

PROSPEKTOJN eldonis en Esperanto lastatempe: La ŝipkompanio Nord Deutscher Lloyd, Bremen, La Pribina-Festoj en Nitra, Ĉeĥoslovakujo kaj la urbo Ljubljana en Jugoslavio. Ĉiuj prospektoj estas tre bele aranĝitaj kaj taŭgaj por allogi la atenton de la esperantistoj al la temo kaj de la neesperantistoj al Esperanto, kiun oni uzas tiel grandskale.

LA FOIRO DE LYON (Francujo) kaj la 24-A UNIVERSALA ESPERANTO KONGRESO en Stockholm eldonis belajn afiŝojn kaj sigelmorkojn. Tiujn de Lyon ricevas ĉiu petanto, la afiŝon de Stockholm ĉiu grupo petanta, la sigelmorkojn de la 24-a tre malkare ĉiu interesiganto.

Informoj pri AELA en 1934

Samtempe ni sendas al vi ekzempleron de la prospekto por 1934 kun la certa scio, ke en tiu ĉi jaro ni povos esti pli akurataj rilate la aperon de la libroj. Ni esperas, ke en la proksimaj tempoj ĉiu ricevos la kvinan verkon, kiu ankoraŭ ĝin ne ricevis kaj ni ĝoje sciigas, ke Enciklopedio de Esperanto jam estas kompostala kaj aperos en du volumoj, anstataŭ la planita unu. Pri tiu temo ni ankoraŭ parolos proksimfoje, kiam ni ekspedos la unuan volumon al niaj membroj.

Ni volas ĉi tie ripeti, ke la malfruo de la libroj 1933. ne influas la limtempon de la plej favora kotizo por la nuna jaro, kio estas 1-a de februaro. Tion ni devis fari pro gravaj teknikaj kaŭzoj kaj ni esperas, ke la limtempon neniu el vi forgesos. Ni petas vin, bonvolu kune kun la pago sendi al ni ankaŭ la aldonitan »Informilo« folion, ĉar sen tio ni ne povus plenumi viajn dezirojn por 1934!

Ni volas diri, ke novajn membrojn por 1933. ni ne plu akceptas. La jaro preskaŭ plene plenumis la esperojn, metitajn antaŭ ĝin kaj ni el kelkaj libroj apenaŭ havas jam ekzemplerojn.

Ni opinias necese alvoki vian atenton al favoro, eble ne tuj rimarkebla. Nome AELA-anoj, repagintaj sian kotizon por 1934. rajtas alpigi sv. fr. 14.— por ricevi duan ekzempleron de la *Enciklopedio*, baldaŭ aperonta. Tiu dua ekzemplero povas servi por iu amiko, kiu ne povis aŭ malfruis aliĝi en 1933. kaj nun ne havas monon por la kotizo kaj superpago, aŭ povas servi por la grupa biblioteko, aŭ eĉ por belega donaco. Tamen ni volas rimarkigi, ke ni ne povas akcepti tian ŝanĝon nur, se ĝi estas indikata sur la informilo resendota.

Ni sendas al ĉiu membro, ne eksiginta, ankaŭ enpagilon. El tiuj landoj, kie la poŝtsparkasa sistemo ne funkcias, ni akceptas poŝtmandatojn al *Pocztowa Kasa Oszczednosci, Krakow, Nr. 403,148 Adm. Literatura Mondo, Polujo* aŭ internaciajn poŝtajn respondkuponojn, kies ekzempleron ni akceptas en la valoro de 0.30 svisaj frankoj. Tiu pagmaniero estas speciale favorega por Argentino, Brazilio, Estonio, Hispanujo, Japanujo, eble eĉ Finnlando kaj kelkaj aliaj landoj.

Ni esperas, ke en la venonta jaro per via helpo ni povos eĉ pli bone plenumi niaj celon: Disvastigi nian literaturon.

Kun plej koraj bondeziroj por la nova jaro, via

ASOCIO DE ESPERANTISTAJ LIBROAMIKOJ.

NIA POŝTO

S-roj Ingen kaj Raison jam ricevis pli frue siajn librojn n-ro 5 kaj do ni ne povas refoje sendi tiajn. Bnv. noti.

F-ino Remmers. Ni volas promesi, ke en la eldonadoj de venonta jaro estos nenio, kio ŝokos vin. Ni ja ankaŭ ĉijare ne intencis tion far, kaj en la estonto ni eĉ pli atentos pri tio.

S-ro Mell. Pardonu, ni eraris ĉe la kalkulo. Ni kalkulis al vi kel sendkostojn por la venonta jaro nur 4.20 kaj ne 4.90 fr. Okaze ni bonvolos alsendi la diferencon.

La proksima numero de la *Bibliografia Gazeto* aperos dum januaro, en duobla formato kaj enhavo, portos la titolon:

LINGVO, LIBRO

kaj kostos nur la egalvaloron de 10 sv. centimoj

Tutan bibliotekon

el
11.000

diversaj malnovaj kaj novaj gazetoj esperantaj, inter ili multaj plenaj jarkolektoj de jam nehaveblaj kaj malaperintaj

Kelkcent uzitaj libroj, gvidlibroj, prospektoj ĵus venis en nian posedon. Nivendas la gazetojn popece, aŭ po jarkolektoj, la librojn uzitajn por tre favora prezo.

Petu grandan kaj detalan liston kiun ni sendas al vi **p r u n t e** post ricevo de 1 respondkupono.

Ni vendas ĉion al la plejmulte oferanto kaj rezervas nenion speciale por iu ajn.



Du ekzemplerojn de
LITERATURA MONDO
por unu respondkupono

ni liveras al ĉiu abonanto kaj AELA ano varbcele, el diversaj numeroj de 1931 kaj 1932.



Plej taŭga materialo por ekspozicioj, por propagando.



Mendante pli ol dek ekzemplerojn, ni donas 20% malplikoste.